Révfülöp, 15/08/2019

Mateo 25:31-46

Karaj gefratoj,
Ni troviĝas antaŭ tre konata teksto, sed teksto ofte miskomprenata. Temas pli pri parabolo ol pri priskribo de la fina juĝo. Krome, kiam oni aŭdas aŭ legas komentojn pri tiuj versikloj, leviĝas pluraj demandoj.
Ĉu la teksto celas la kredantojn aŭ la nekredantojn, la naciojn, ĉu ambaŭ ? Ni ja scias dank' al la Reformatoroj kaj ne nur ili, ke la savo de la kredantoj ne ligiĝas al ilia agado. La savo estas kaj restas senmerita donaco de Dio.
Kiuj estas tiuj plej malgrandaj fratoj de la Reĝo (ĉu de Jesuo ?) ? Ĉu la malriĉuloj, la bezonantoj estas Jesuo mem, estas bildoj de Jesuo ? Ĉu tiuj estas la disĉiploj (miaj fratoj) ?

Tamen, estas konkludoj, kiuj ne dependas de la respondoj al tiuj demandoj.

Oni povas imagi al si la rakonton kiel sceno de opero, teatro aŭ kino, tre impona, impresa kaj majesta sceno. Multaj homoj, amasoj, antaŭ anĝeloj kiuj ĉirkaŭas reĝon, lumo, bruo, muziko, laŭdkantoj.

Tiu rakonto, ĉar esence ĝi estas rakonto, prezentas kvar grupojn.
Unue kaj ĉefe, la Filo de homo, poste nomata la Reĝo, kun la anĝeloj, en gloro kaj majesto.
Poste du grupoj de la nacioj aŭ nacianoj, dekstre kaj maldekstre. Kompreneble, ne temas pri politiko.
La kvara grupo ne videblas, sed ili estas ĉie en la paroloj, temas pri la mankhavaj, malgrandaj homoj, ankaŭ nomataj la fratoj de la Reĝo.

Apud la paroloj estas ankaŭ moviĝoj.
La Reĝo venigas la dekstran grupon al heredo de la Regno, preparata por ili. Tiuj estas diritaj benataj.
La Reĝo forpelas la maldekstran grupon al eterna fajro preparita por la diablo kaj liaj anĝeloj. Ili estas diritaj malbenitaj.
Parenteze, mi ne scias kial la tradukistoj malsame eletis la participojn : benata kaj malbenita.

La Reĝo gratulis kaj riproĉis la grupojn pri similaj agado kaj senagado, antaŭ la mankhavaj homoj, tiuj asimilitaj al la Reĝo mem. Tion neniu antaŭsciis, konsciis.

Tradiciaj interpretoj de la rakonto asimilas tiujn senhavulojn al la Reĝo kiu estus Jesuo mem. Kaj tion oni ofte aŭdas en predikoj, kantas en himnoj. Aliaj predikas ke la disĉiploj estas tiuj, ke ili povas troviĝi en tiu situacio de bezonantoj.

Tamen, mi volas iri pli kernen. Ne estas utile identigi la malriĉulon kun Jesuo. Oni ne devas helpi la malriĉulon por helpi Jesuon. Oni ne devas helpi la malriĉulon ĉar oni helpus Jesuon. Sed oni devas helpi la malriĉulon por helpi la malriĉulon, nutri la malsatulon por nutri la malsatulon, trinkigi la soifanton por trinkigi la soifanton, gastigi la fremdulon por gastigi la fremdulon, vesti la nudulon por vesti la nudulon, viziti la malsanulon por viziti la malsanulon, iri al la malliberulo por iri al la malliberulo.

Heredi la Regnon, la regnon preparitan de la komenco, tio ne estas nur en la futuro. Tio estas ankaŭ efektiva nun, efektivenda nun. Kaj la efektivigo de la Regno venas ĝuste kiam oni agas en la ĝusta maniero priskribita en tiu rakonto. La Regno de Dio estas kaj jam ĉi tie, kaj ankoraŭ ne alveninta. Ĝi estas promeso, espero kaj samtempe tasko, vivenda efektivigo.

La disĉiplo estas en la nuna tempo, mondo, eono, kaj en la venanta. La eterna vivo promesita al la justuloj en la konkludo de la rakonto estas jam donacita al la disĉiplo nune por vivi. La disĉiplo estas

en la mondo sed ne plu apartenas al la mondo. La disĉiplo estas fremdulo, vojaĝanto en tiu ĉi mondo, en ĉi tiu tempo. Li, ŝi, apartenas al alia eono, al eterneco, jam.

Fakte, malgraŭ ke ĝi utilas por bone kaj juste vivi, tiu ĉi parabolo ne estas referenco por sin mezuri. Jesuo ne demandas nin, ke ni nin mezuru ĉiam. Ni ja scias ke ni estas pekuloj, sed pardonitaj pekuloj, engaĝitaj en alia regno, per alia leĝo, eterna, la leĝo de la nemeritita amo de Dio, kiun ni estas petataj respeguli al la nuna mondo, kiun ni estas petataj atesti al la nuna mondo.

Se tiu parabolo estus bildo de la fina juĝo de la nacioj, ĉu ĝi efektive koncernus la disĉiplojn ? Certe ne en tio ke ĝi estus la kriterio por saviĝo. Pli efike en tio ke ĝi indikas la trafan manieron vivi la Regnon de Dio inter la bezonantoj.

Tiu ĉi rakonto parolas pri apartigo. Oni komprenis ĝin kiel juĝon. Tamen, ni ne forgesu ke apartigo estas ankaŭ sinonimo de sanktigo. Ĉu ne pli bone ni povas preni por ni tiun signifon, ke nia apartigita vivo de disĉiplo de Jesuo troviĝas ne en la pasintaj agoj -  ni ja estas pekuloj – sed en la postulata konduto al la bezonantoj. Tio ne koncernas nian saviĝon. Tio koncernas la bezonojn de tiuj malgrandaj de la rakonto.

Kaj inter ili troviĝas la fremdulo. Ni kredantoj, nun apartigitaj, fremdaj en ĉi tiu mondo, ne povas neglekti, ignori la fremdulojn en tiu mondo kie ni vivas kaj atestas.
La akcepto, la gastigo de la fremdulo, de la ekzilito, de la enmigrinto, de la rifuĝinto, apartenas al la ĝustaj agadoj de la justuloj, al la karakterizoj de la Regno de Dio.

Fine de la parabolo de la bona Samariano, al la leĝisto kiu ĵus diris ke la proksimulo estas tiu kiu faris kompaton, Jesuo diris, kaj mi finos per tio : Iru vi, kaj faru tion saman.

Amen